

La angla lingvo kreos novan mondordon

Lingvo(j) en la 21a jarcento laŭ Steven Roger Fischer

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli

En sia libro (*Konciza) historio de la lingvo*¹ (1999) la novzelanda lingvosciencisto **Steven Roger Fischer**² aldonis legindan ĉapitron pri la temo „Lingvo en la 21a jarcento“ por trovi respondojn al la demando kiel aspektos aŭ povus aspekti la estonta lingva pejzaĝo de la mondo. Ĉar tiu ĉapitro entenas kelkajn interesajn konsiderojn lige kun interlingvistikaj diskutoj, indas resumi ĉi tie la ideojn de la novzelanda lingvisto en formo de recenza studaĵo surbaze de la koncernaj ĉapitroj en lia libro.

Nature, kiel la aŭtoro enkonduke avertas, estas malfacile doni fidindajn prognozojn pri la demando kiel aspektos la lingvoj en la estonteco. Multaj faktoroj konstante ŝanĝas la lingvon de socio: ekonomiaj renversoj, revolucioj, ondoj de elmigrado, subita leviĝo de iuj popoloj kiel gvidaj nacioj, novaj teknologioj kaj modoj, por nomi nur kelkajn facetojn. Sed ĉar ni konas la procezojn de la lingvoŝanĝiĝo en pli fruaj tempoj kaj la tendencojn de la lingva evoluo en la nuntempo, ni povas riski prognozon, almenaŭ por la proksima tempo. En tio, la angla lingvo kaj la klopodoj de registaroj kaj entreprenistoj en anglalingvaj landoj, kiuj konscie planas la aferojn de la estonteco, ludos centran rolon.

Sian bazan hipotezon Fischer tuj prezentas en la komenco: En la fundamentaj ŝanĝiĝoj de la rilatoj inter la okcidentaj nacioj kaj la resto de la mondo, kiuj eble formos novan mondan ordon, pri kiu hodiaŭ ni ankoraŭ ne havas klaran imagon, plej verŝajne formiĝos ankaŭ pli grandaj naciaj kaj organizaj unuoj, kio signifos, ke estos uzataj *malpli*³ da lingvoj.

De tiu neimagebla procezo de la ŝanĝiĝoj de la rilatoj, en kiu ĉiu homa ekzistaĵo devos trovi novan lokon, ankaŭ la lingva demando estas koncernata, kio signifas, ke eĉ por la nocio de la lingvo mem devos esti trovita nova difino. Precipe novaj teknologioj kiel la programlingvoj vastigos la uzadon de la homa lingvo je unu komplete nova dimensio, nome sur la kampo de la aplikado en la *artefarita komunikado* mem. Krom tio, ankoraŭ alia fenomeno estas observebla: Kvankam la lingvoj de la mondo ankaŭ plue ŝanĝiĝos laŭ la tradicia maniero, la lingvoj ne plu restos limigitaj al ununura natura geografia lingvozono, sed ili forlasas tiun zonon por disvastiĝi tra aliaj landoj. Tio validas precipe por la angla, hispana kaj ĉina lingvoj, la plej vaste uzataj en la nuntempa mondo. Tiu procezo havos antaŭ ĉio gravajn sociekonomiajn sekvojn por la homaro. Per aliaj vortoj: la scipovo de unu el tiuj grandaj lingvoj estos esenca por la sorto de individuo: ĝi decidos pri bonfarto aŭ mizero, pri riĉeco aŭ malriĉeco, pri ekzisto aŭ malekzisto de homo en la monda (labora) sfero. Do, la rilatoj inter lingvo, ekonomio kaj socio fariĝos draste evidentaj kaj esencaj, kaj ili forpuŝos ĉiujn aliajn kriteriojn pri lingvouzado, ekzemple etikajn aŭ formalajn (kiel korekta lingvouzado).

Programlingvoj de la informadiko

La celo de ĉiu lingvo estas garantii la komunikadon. Tio validas ankaŭ por la artefaritaj programlingvoj de la informadiko. Ĉiu programlingvo utiligas siajn algoritmojn, datenstrukturon kaj programgvidadon laŭ alia maniero kaj bezono. Programlingvoj difinas sintakson (t.e. permesatajn simbol-kombinojn), semantikon (t.e. la signifon de la signoj) kaj lingvomodelon (t.e. la skemon por solvi specifajn problemojn). Iusence, programlingvoj funkcias kiel homaj lingvoj, sed ekzistas gravaj diferencoj. Fischer mencias diversajn tipojn de programlingvaj modeloj, da kiuj aktuale ekzistas granda nombro, kaj koncize klasifikas ilian kategorion, priskribante ilian esencon. Ekzemple Fortran, Pascal, C

¹ Originala titolo *A History of Language* (1999); ĉi tie laŭ la germana versio Steven Roger Fischer: *Eine kleine Geschichte der Sprache*, dtv München 2003.

² Steven Roger Fischer, kiu studis lingvosciencon en Novzelando kaj Germanio, estas iama direktoro de la Instituto pri Polineziaj Lingvoj kaj Literaturoj en Auckland, Novzeland. Li kontribuis al la deĉifrado de la Rongorongo-skribo de la Paskaj Insuloj (1995) kaj – inter multaj aliaj prvoj – de la Disko de Faisto (Festo), en 1988.

³ Kursivigado fare de la recenzanto.

kaj Assembly Code estas nomitaj „imperativaj aŭ procedaj“ programlingvoj, C++, Java, Eiffel, Simula kaj Smalltalk-80 estas „objektorientitaj“ programlingvoj, PROLOG estas „logika“ programlingvo, ML, Haskell, FP kaj Gofer nomiĝas „funkciaj“ programlingvoj, kaj inter la „paralelaj“ programlingvoj oni trovas ekzemplojn kiel ADA, Modula-2 kaj C*. Simile kiel ĉe la naturaj lingvoj, ankaŭ programlingvoj formas familiojn, parencojn kaj geneologiajn arbojn. Sed kompare kun la naturaj lingvoj, la programlingvoj ne estas biologiaj, ĉar ili ne posedas sonojn kaj ne estas ligitaj al konkreta etno, popolo, nacio aŭ ŝtato. Programlingvoj ankaŭ ne povas nature kreski aŭ disvastiĝi, ĉar il estas nur sistemia kodoprocezo, kiu ekzistas nur en la virtuala mondo. Sed eĉ tio ŝanĝiĝos: Teksasaj informadikistoj estas konstruantaj artefaritan nervan sistemon, kies tasko estos imiti por la komunikado la necesajn procedojn en la homa cerbo por permesi al roboto akcepti diversajn informojn tra specialaj sensoroj por fari memstarajn decidojn. La fina celo de tiu evoluo estu, ke programlingvo funkcii inter robotoj kaj komputiloj unuflanke kaj homoj aliflanke kiel normala komunikilo. Estas vaste konata realeco, ke en la tuta mondo komputiloj jam komunikadas inter si, uzante larĝan spektron da programlingvoj, simile kiel en la komunikado inter homo kaj *besto*. Do, la venonta ŝtupo estos la komunikado inter komputiloj kaj homoj. Baldaŭ ekzistos ankaŭ programoj, kiuj permesos al la homoj paroli kun komputiloj, se ili ne jam estas inventitaj

Ĉi tiuj faktoj pri artefaritaj programlingvoj estas esencaj por kompreni kio ek de kelkaj jardekoj nesubtakseble jam okazas sur la informadika kampo, precipe en la tutmonda interreto, kiu translime vastiĝas pli kaj pli inter la nacioj kaj individuoj, kaj por kompreni, kien la lingva evoluo iras. Do tiuj konoj, scioj, observoj kaj klarigoj estas gravaj por povi ĝuste pritaksi kaj antaŭvidi la karakteron kaj la tendencojn de la estonta monda lingvo-evoluo, kiu diferenciĝos je kelkaj gravaj aspektoj kompare kun la lingvo-evoluo de la pasinto.

Novaj teknologioj ŝanĝos la lingvo-stilon

Kiuj estas, inter alie, la specifaĵoj de la estonta komunikado? Precipe la komunikado en la tutmonda interreto fariĝis aparta kazo. En scienca esploro farita en la jaroj 1989/90 inter anoj de superaj lernejoj en pluraj landoj (i.a. en Finnlando, Britio, Usono, Aŭstrio, Kanado, Germanio, Svedio, Japanio, Islando⁴) oni konkludis, ke la skriba interreta komunikado similas al la parola homa komunikado. Ambaŭ formoj de komunikado praktikas leĝeran sendevigan lingvostilon kun multaj vulgarparolaj esprimoj, ellasaĵoj kaj koncizigoj. Ĉi tiun lingvaĵon oni povus nomi elektronika, kiel mi sugestas. La lingvouzado en retmesaĝoj kaj novaĵgrupoj okupas apartan pozicion inter la parolata kaj skribata lingvo. Dum ‘offline’-tekstoj estas hierarkie kaj kuntekste pli homogenaj, tekstoj, kiuj estas verkitaj ‘online’, montras tiurilate malpli grandan disciplinon.⁵ Do, oni povus diri, ke la elektronika lingvo iel sovaĝiĝos, sed Fischer ne vidas tiun evoluon negative. Nu, tiaj specifaĵoj kaj tendencoj, kiujn oni esploris en la 1990aj jaroj, intertempe estas sufiĉe bone konataj. Intertempe aperis novaj teknologioj kiel SMS (kaj Tvitero en 2006), kiuj estas parto de la mikroblogo, per kiu la komunikantoj estas devigataj esprimi sin ege kurte kaj koncize, nome per nur po 140 unikodaj signoj por mesaĝo. Ankaŭ en Fejsbuko, kiu estis enkondukita en 2004, ĝermas propra lingvotipo, kiu havas malmulton komunan kun la tradicia skriba komunikado. Sed ne la lingvo-praktikado de tiuj „sociaj retoj“ en si mem estas ĉefa celo de la kritiko; gravan danĝeron en ilia praktikado la responsuloj de ŝtataj instancoj vidas precipe en la lezado de la protektado de personaj datenoj. En la tempo de la amasa kaj ofte facilanima dissendado de elektronikaj datenoj, ekzemple en la erotika sfero, kie povas okazi drastaj misuzoj kun fatalaj sekvoj, la demando de la protektado de la personaj datenoj do fariĝos ankoraŭ pli aktuala kaj serioza.

Sed ni revenu al la ĉapitro pri la lingvo de la 21a jarcento. Certe, necesas atentigi ankaŭ pri aliaj danĝeroj de la elektronika lingvouzado. Kvankam Fischer ŝajnas tute favori la menciitajn tendencojn, li ankaŭ bone konscias, ke en la elektronika lingvo perdiĝos gravaj elementoj de la homa lingvo, ekzemple la dimensioj de vidado, aŭdado, odorflarado kaj esprimado de gestoj, kvankam nelegeblaj gestoj en la elektronika komunikado estos faritaj legeblaj. Tio ĝuste okazas en la komunikado per SMS, Tvitero kaj

⁴ Vd. Seppo Tella: Introducing International Communications Networks and Electronic Mail in Foreign Language Classrooms. A Case Study in Finnish Senior Secondary Schools. Diss. University of Helsinki 1991. (<http://www.helsinki.fi/~tella/95abst.html>)

⁵ Ankoraŭfoje vd. Seppo Tella: Talking Shop Via E-Mail. A Thematic and Linguistic of Electronic Mail Communication. Helsinki 1992. (<http://www.helsinki.fi/~tella/99.pdf>).

Fejsbuko. Do, la elektronika lingvo estos iusence senhomecigita lingvo, kaj ĉiukaze Fischer kredas, ke la interreto, kiom ajn utila ĝi estas ekzemple ankaŭ por la lingvolernado, ne povos plene anstataŭi la homajn bezonojn, inter alie la rektan fizikan komunikadon inter-homan. Kvankam tiuj tendencoj jam estas praktikataj, ŝajnas, ke la danĝero, ke tiu rekta homkontaktado povus pereĵ kaj malaperi, dume tamen ne estas tre reala.

Rolo de la angla lingvo

Koncerne la rolon de la angla lingvo, kiun ĝi ludas en la interreto: Kvankam la internacia standardigita angla estas ĝia ĉefa lingvo, ĝi tamen ne estas la oficiala lingvo de la interreto, kiu ne konas fiksjajn regulojn. Kelkaj skeptikuloj opinias ankaŭ, ke pere de la angla lingvo la „imperiismaj“ ŝtatoj gvidataj de Usono dominas kaj kontrolas la interreton. Sed kiel Fischer klarigas, la kaŭzoj por la supereco de la angla lingvo en la interreto estas, ke la anglalingvaj landoj kreis la interreton kaj ke la angla lingvo estas la plej populara dua lingvo en la mondo. Estas klare, ke kun tia domina lingva rolo estas ligita ankaŭ forta kultura influo, kiu esprimiĝas ĝuste en la lingvo mem. Amaso da anglalingvaj teknikaj vortoj kiel *bit, browser, click, mouse, cyberspace, e-mail, hypertext, link, modem, download, laserprinter, software, handy, domain, webhosting, applet, attachment, assembler, bookmark, blog, server, cache, gateway, gigabyte, account, groupware, guideline, motherboard, mail-bomb, mailing-list, mainframe, mapping, memory, call-center, CD-ROM, chat, client, cookie, copyright, cursor, crack, clipart, counter, disclaimer, default, desktop, micropayment, metatag, multitasking, page-view, patchwork, peer-to-peer, user, explorer, editor, emoticon, event, ebook, feedback, harddisk, filename, firewall, forward, frame, freemail, freeware, frontend, filesaver, frontpage, floppy disc, feature, skill, icon, interactive, interface, internet, intranet, keyboard, converter, login, logout, laptop, layout, nameserver, netiquette, navigator, network, newsletter, nickname, online, offline, switch, scanner, screen, script, scrolling, service, shortcut, sitemap, smiley, sound, spam, support, tasklist, template, terminal, thumbnail, tool, traffic, tutorial, unsubscribe, update, upgrade, uninstall, zoom, wireless lan, webdesign, web based training, webcam, webmaster, wepage, web-publishing, website, workflow* ktp. ktp.⁶ estas rekte transprenitaj de la naciaj lingvoj kies integra parto de la vortaro ili fariĝis.

Fischer esperas, ke unusola oficiala lingvo de la interreto neniam ekzistos, sed nur unu aŭ kelkaj lingvoj, kiujn la uzantoj vere deziras kaj utiligas. Nuntempe, la angla lingvo dominas la interreton. Sed oni povus imagi, ke en estonteco alia lingvo anstataŭos la anglan. Iu reguliga instanco, ekzemple ICANN, povus elekti iun artefaritan lingvon kiel alternativon, eĉ se tio estas malverŝajna. Entute, aŭtomataj komputilaj traduksistemoj povus fari la tutan diskuton pri supera natura lingvo superflua. Oni devus nur decidi pri unusola programlingvo, kiu povas traduki niajn tekstojn kaj konversaciojn. Per tio la universala natura lingvo inkluzive de la angla fariĝus nenecesa kaj malvalida.

Ekster la *cyberspaco*, kiu grandparte estas anglalingva, la dulingveco dume daŭre kreskas. Pli kaj pli da homoj en la mondo decidas lerni la anglan lingvon kiel duan lingvon, dum por la komunikado en sia loka ĉirkaŭaĵo ili ŝajnas konservi la denaskan lingvon.

Ĉu lingvoj amase elmortos ?

Rigarde al la du venontaj jarcentoj, Fischer antaŭvidas ne nur senprecedencan malaperadon de lingvoj kaj ke plimulto de la homaro utiligos la anglan kiel unuan aŭ duan lingvon. La malmultaj (sic) lingvoj, kiuj postvivis tiun erozian procezon, draste ŝanĝos sian tipologian strukturon, tiel ke aperos tute novaj lingvaj klasifikoj. Ekzemple la mandarena (ĉina) lingvo probable fariĝos malpli izola sed pli aglutina kaj plursilaba, dum la eŭropaj lingvoj fariĝos ĝenerale pli izolaj.⁷

⁶ Al la mallonga listo de Fischer mi mem aldonis aron da tipaj aktualaj terminoj.

⁷ Esperanto kun ties ekstreme aglutina sistemo reprezentas la inversan tendencon, al multisilabeco. La esperantistoj kredas, ke amasa kunmetado de diversaj afiksoj faciligas la komprenon de lingvo. Por malgravigi la rolon de la malamata angla lingvo realecfremdaj Esperanto-fanatikuloj, inter ili multaj maldekstruloj (komunistoj) kaj malamikoj de Usono, inventas plej diversajn absurdajn fantaziaĵojn kaj grotekajn asertojn, kiujn ili prezentas en siaj libroj, artikoloj kaj retpaĝoj kaj ne rimarkas, ke la kredindeco de iliaj teorioj, precipe en la scienca mondo, estas kvazaŭ nula.

Ankaŭ en sociaj rilatoj la lingvouzado ŝanĝiĝos, se ni pensas pri la kutimo, ke pli kaj pli da homoj en diversaj lingvoj transiras de *vi* al *ci*. Alia modo koncernas la nerektan parolon, pri kiu oni pli kaj pli rezignas ankaŭ en la skriba uzado. En multaj kazoj pli ofte uzata estas la dativo anstataŭ la genitivo (ekzemple en la germana lingvo). Ktp. En pli fruaj tempoj la nekorekta uzado de la gramatiko laŭ la nacilingvaj oficialaj referencaj verkoj (Oxford, Duden) estas konsiderata preskaŭ kiel krimo. Okazas eĉ fonetikaj modifoj kiel ekzemple en la lingvo Rapanui de la Paskaj Insuloj. En ĉi tiu lingvo, grandparto de la vortaro estis interŝanĝita kun tahitiaj elementoj. Sed antaŭvideble tiuj vortoj inkluzive de la lingvo mem verŝajne fariĝos baldaŭ viktimo de la hispana lingvo kiel ĝi estas uzata en Ĉilio. Ankaŭ en la kimra lingvo estas observeblaj interesaj fonetikaj evoluoj. En ĉi tiu lingvo perdiĝis la fina *f*, kio signifas, ke *tref* (urbo) restis nur *tre*, ktp. Kaj la malnova kelta sistemo de la nominala nombrado estis anstataŭita de la nova kimra sistemo. Sed tiuj estas bagateloj. Fischer estimas, ke baldaŭ ĉiuj tiuj lingvoj malaperos kaj restos nur la angla lingvo, kiu fariĝos la nova kaj ununura natura mondlingvo.

La angla lingvo mem ŝanĝiĝos

Kaj kiel la aŭtoro montras, la angla lingvo mem travivas drastajn lingvajn evoluojn. Ekzemple en la usona angla forviŝiĝas la limoj inter *t* kaj *d*, tiel ke, almenaŭ ĉe la prononco, ne plu ekzistas diferenco inter *matter* kaj *madder*, *writer* kaj *wrider*, *whitest* kaj *widest*, tiel ke la signifon de tiuj vortoj oni povas kompreni nur laŭ la kunteksto. Supozeble ĉi tiuj tendencoj divastiĝos tra la tuta angla lingvo, ĉar la influo de la usona angla estas enorma. Sed povas ankaŭ okazi, ke la anglan lingvon enpentros nemalmultaj hispanaj vortoj. La angla lingvo eble riĉiĝos ankaŭ per vortoj el lingvoj, kiujn ĝi mem forpuŝis: Tiel, la aŭstralia, novzelanda kaj sudafrika versioj de la angla lingvo ricevos pli da vortoj el indiĝenaj lingvoj, kiuj kune formas la novan standardon de la moderna internacia angla lingvo. Ĉi tiu lingvo estos la produkto, kiu konformas al la bezonoj de socio, kiu postulas komunikadon kaj informadon sur internacia nivelo. Precipe la moderna teknologio favoras tiun procezon, do inter apliko de moderna teknologio kaj disvastiĝo de internacia formo de la angla lingvo ekzistas intima interligo.

En la angla lingvo mem la lingvaj tendencoj eble iros ankaŭ en tiu direkto, kiel oni povis aŭdi paroli iun usonaninon en la Meza Okcidento en 1998, kiam ŝi diris *my dar wa sin*, kio devis signifi *my daughter was sitting*. En tiu ekzemplo *daughter* reduktiĝas al *dar* kaj *sitting* fariĝas *sin*. Ankaŭ adjektivoj okupas en la angla lingvo ĉiam pli ofte la signifon de substantivoj, ekzemple *a professional* signifas profesiulon, *a black (person)* signifas nigrulon kaj *a white* signifas blankulon, *a historical* signifas historian novelon kaj *a botanical* estas natura medikamento el herboj, ktp. Krom tio, anstataŭ *a Californian wine* oni pli kaj pli diros *a California wine* kaj anstataŭ *the British royals* oni probable diros *the Britain royals*, ktp. Ankaŭ prepozicioj estas tuŝitaj de similaj evoluoj (ekzemple *at-risk patients* anstataŭ *patients at risk*, ktp.).

Ankaŭ en la germana lingvo okazis kaj ankoraŭ okazos treege interesaj evoluoj, kiuj estas konataj kiel *Neudeutsch*, en kiu nove kreitaj vortoj, nocioj kaj tutaj frazoj ricevas novan semantikon.⁸ Intertempe la germana lingvo ampleksas 5,3 milionojn da vortoj. En la pasintaj cent jaroj la vortrezoro de la germana lingvo kreskis je unu triono.⁹ Do, certe ne ekzistas kialo por timi, ke la germana lingvo baldaŭ mortos aŭ malaperos, des pli ke ĝin parolas minimume 100 milionoj da homoj.

Dum en la plimulto de la landoj la homoj fervore lernas la anglan, ekzemple en Skandinavio, Nederlando kaj Singapuro estas observebla la situacio, kiu estas supre aludita: La loĝantaro de tiu landaro parolas esence du lingvojn: sian denaskan kaj la anglan kiel duan lingvon. Probable, landoj kiel Germanio, Francio aŭ Japanio ankoraŭ longe ne pretos rezigni pri siaj naciaj lingvoj, kvankam ankaŭ tie la angla rapide disvastiĝas, kaj lingvoj kiel la latina, hebrea, araba servos unuavice al religiaj celoj. Tiel, la angla lingvo kreos novan mondordon, kvankam multaj homoj timas, ke per unusola mondlingvo ekzistos la danĝero, ke la senekzempla politika manipulado, propagando kaj kontrolo kreskos kaj ke la kultura identeco de homoj perdiĝos. Tio estas la malnovaj argumentoj, kiujn ankaŭ la esperantistoj reprezentas. Certe, unusola mondlingvo povus alporti avantaĝojn, sed eble la agenda prezo estos tro alta. Do, Fischer sendube konscias pri tiu problemo, sed li pragmate rilatas al ĝi, ĉar la lingva ordo ĉiukaze nature evoluos kune kun la homaro, kiel tio okazis jam de ĉirkaŭ unu miliono da jaroj. Hodiaŭ,

⁸ Ekzemplojn vd. sub <http://www.lau-net.de/d/dimmel/neudeutsch.pdf> kaj <http://www.welt.de/kultur/article4155107/Die-wichtigsten-neuen-Woerter-im-aktuellen-Duden.html>

⁹ Vd. <http://www.welt.de/kultur/article124064744/Die-deutsche-Sprache-hat-5-3-Millionen-Woerter.html>

la uzado de la angla lingvo simple konformas al pure ekonomia neceso. Kaj la homaro libervole lernas ĝin.

Povas esti, ke la aŭtoro estas tro pesimisma rilate la baldaŭan malaperon de la plimulto de lingvoj sur la tero. Ŝajnas, ke ĉi tiun timon li dividas kun la esperantistoj. Sed ĉu vere eblas suspekti aŭ eĉ akuzi la anglan lingvon kiel solan kulpanton pri la malapero de lingvoj ? Tre dubinde, ĉar amaso da aliaj faktoroj ludas esencan rolon en tiu proceso. Sendube, la lingvoj de malgrandaj triboj, kiuj vivas kiel en la ŝtonepoko (ekzemple indianoj), estas serioze minacataj de mortado, sed ankaŭ la dialektoj de iuj arkaikaj komunumoj (kiel en la profundoj de Francio kaj Italio), ĉar ili ignoras kaj kontraŭstaras la modernan civilizan progreson kaj detruas sin mem. En Ruslando, Ĉinio kaj Latinameriko la minoritataj lingvoj ne malaperas/is pro la angla lingvo, sed pro la forpuŝa-diskriminacia efiko de la rusa, ĉina kaj hispana lingvoj. Aliflanke, iuj malgrandaj lingvoj kiel ekzemple la estona, latva, litova, slovena aŭ svisalemana fariĝis la ĉefaj lingvoj de malgrandaj hipermodernaj kaj tre dinamikaj socioj, kiuj fieras pri tiuj lingvoj, aplikas ilin en ĉiuj sferoj de la vivo kaj faras ĉion por subteni, prosperigi kaj konservi ilin. Tiajn kazojn la aŭtoro ne menciis, sed ili estas tre gravaj por kompletigi la buntan lingvan pejzaĝon, ekzemple en Eŭropo, kie la politiko, lerninte siajn lecionojn el la pasinteco, ĝuste faras ĉion por fortigi minoritatajn lingvojn, eĉ se en tiu kontinento la angla lingvo jam delonge funkcias kiel *lingua franca*, precipe en kelkaj specifaj branĉoj (kiel diplomatio, ekonomio, turismo, informadiko). Sed oni ne forgesu, ke milionoj da homoj malbone parolas aŭ eĉ ne scipovas la anglan lingvon kaj preferas utiligi sian denaskan lingvon.

Esperanto restos senŝanca

Kaj Esperanto? Fischer tute ne ignoras ankaŭ la demandon de la artefaritaj planlingvoj, atribuite al Esperanto, kiun li klasifikas inter la *rekonstruitaj* lingvoj, la statuson de tia artefarita lingvo kun plej forta proksimeco al la „reguleco de protolingvoj“ (sic). Samtempe tiaj lingvoj ankaŭ montras, laŭ Fischer, kiom „malproksima estas la distanco inter realeco kaj rekonstruo“ (sic) ĉe ili. Fischer agnoskas, ke certagrada teoria kaj praktika intereso pri artefaritaj planlingvoj daŭre ekzistas, kaj el historia vidpunkto li eĉ trovas la kampon fascina. Tamen, li ankaŭ konstatas, ke tiaj lingvoj promesas nenium praktikan utilon plu (sic), inter alie ĉar al ili mankas ĝuste la universaleco (sic), per kiu ili ambicias esti konstruitaj. Fischer ne pretas akcepti ilian pretendon voli esti same naturaj kiel artefaritaj lingvoj. Alian kaŭzon por la malaktualiĝo de artefaritaj lingvoj Fischer vidas en ilia ideologia rolo, kiun ili ludis en la epoko de la formado de nacistŝtatoj por kontraŭstari koloniismon kaj naciismon. En la 21a jarcento tiu kondiĉo mankas, ĉar la plimulto de la grandaj mondlingvoj (angla, hispana, ĉina) ne plu estas ligitaj al ununura nacio, lando aŭ ŝtato, sed ili havas transliman funkcion. Ĉar naturaj mondlingvoj aŭtomate aperas en la historio de la homaro, la konstruado de apartaj artefaritaj planlingvoj, kiuj volas ludi la rolon de naturaj lingvoj, laŭ tiu novzelanda aŭtoro do ne plu estas vere bezonata. Kompreneble, aŭtoroj, al kiuj mankas la sperto de la praktika uzado de planlingvo, povas veni ankaŭ al malĝustaj konkludoj.